


# Kulturaj Kajeroj


DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

**JARABONO :**

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1971 5

# KULTURAJ KAJEROJ

1971 SEPTEMBRO - OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

**Komitatanoj :**

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

**Pri Grésillon**

**Dankon al preleginto** — P. Métivier

**Esperanto tra la mondo** — A. Frangeul

**Vizono.**

**La granda piramido** — E. Motillon

**Vivo buljono en la supozita vakuo de la galaksiaj spacegoj**

**El « La leono »**

**El « Pomoj por Eva »**

**Nia konkurso** — P. Chevalier

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

# El Grésillon

El ĉiuj kontinentoj, el 22 landoj, venis 450 gesamideanoj al Grésillon lastan someron. Granda sukceso de ĉiuj periodoj. Oni multe lernis kaj praktikis nian lingvon. La etoso estis bona kaj ĉiuj partoprenintoj forlasis la kastelon kun tre agrablaj memoroj. La novaj plibonigoj estis alte taksataj kaj ĉefe ĉiuj laŭdis la kuiristojn. Kompreneble ankaŭ la stomako havas memorkapablon !

Ni tre baldaŭ preparos la venontjaran programon. Por Pasko jam anonciĝas la Kultura Semajno de U.F.E., grandsukcesa lastan jaron kaj kiu, en 1972, estos organizita de JEFO, la franca branĉo de TEJO. La gejunuloj jam pretigis allogan programon. Tiu KS okazos post la Nacia Kongreso de Nantes, t.e. de la 3a ĝis la 9a de Aprilo. Antaŭ la Nacia Kongreso (31-3 4-4) jam okazos renkontiĝo plurtaga en Grésillon, kiu konsistigos veran Antaŭ-kongreson. Do, geamikoj, profitu la okazon : partoprenu la antaŭ-kongreson en Grésillon kaj la Nacian Kongreson en Nantes.

Jam ni antaŭvidas novajn plibonigojn en la kastelo, kiuj alportos al ĉiuj vizitantoj novajn kialojn por ankoraŭ pli ĝui sian restadon.

## DANKON AL PRELEGINTO

Invitita prelegi en la Esperantista kulturdomo-Gresillon, dum la someraj ferioj, S-ro Rollinger el Bad Kissingen (Germanujo) prezentis la temon : Naskiĝo de la arto.

La celo de la prelego estis atentigi pri la fakto ke estiĝis la unuaj manifestiĝoj de la arto en la kavernoj de la glaciepoko.

Post rapida prezento de pejzaĝaj bildoj kiuj situas la ĉefajn kavernojn en suda Francujo (valo de Dordogne) kaj en norda Hispanujo kaj Maroko, la preleganto, per sperte elektitaj bildoj, klarigas la evoluon de la desergnarto dum la lastaj 40.000 jaroj de la glaciepoko. Ek de la unuaj provoj kie la bestoj (ĉar ĉiam nur ili estas reprezentitaj) aperas nur konture gravuritaj sur la rokaj vandoj de la grotoj, ĝis kiam jam aperas pli fidelformaj trajtoj kaj jam altgrade fiksiĝas la esprimoj en la okuloj kaj, fine, ni admiras la verkojn de la homoj de la Magdalenio kiuj atingas kulminan punkton kun la perfektaj polikromiaj pentraĵoj. Tie ankoraŭ elstaras la ĉasbestoj sed nun en grupaj scenoj, pli abunde. Nur tiam, la homo mem ŝajnas konsciiĝi pri sia propra ekzisto kaj komencas sin bildigi per mallertaj linioj.

Kun avideco ni sekvas nian preleganton kiu en perfekta kaj flua lingvo prezentas tiun ege interesan temon. Dume, la fajraj sunradioj de la somero facile invitus al promenado en la parko de la kastelo, tamen ni volonte ankoraŭ restus en la mallumo de la kavernoj kun la homoj de la glaciepoko por provi kompreni pli profunde la klopodojn kaj sukcesojn de la arta esprimo.

Tre certe, S-ro Hugo Rollinger povus ankoraŭ malkovrigi al ni multajn sekretojn kaj ni ĉiam re-aŭdos lin kun granda intereso.

Vi revenu estonte al Gresillon, ni atendas vin plezure.

P. METIVIER.

**La programo estos preta en decembro. Sed jam pensu pri viaj esperantistaj ferioj.**

**Vi scias, ke en Grésillon vi ne estos elrevigitaj**

# Esperanto tra la Mondo

## LA UNIVERSALA KONGRESO EN LONDONO

Inter la 31a de Julio kaj la 7a de Aŭgusto, la 56a Universala Kongreso de Esperanto arigis 2.071 partoprenantojn el 40 landoj.

En la konkludo de la festparolado, S-ro Lapenna alvokis la popolojn kaj registarojn solvi la lingvan demandon « per vere internacia lingvo, laŭ maniero digna de homo en la fino de la dudeka jarcento. »

Krom la kutimaj eroj de la programo, okazis forumo pri « lingva komunikado en la nuntempa mondo », kun partopreno de reprezentanto de British Council.

Konkludo de debato pri neŭtraleco reafirmis la neceson de neŭtraleco por U.E.A. laŭ la nuna kompreno, ligita kun la respekto de la homaj rajtoj.

La brita kaj kultura vesperoj, la teatra prezentado (dum kiu Bulgara Esperanta Teatro bonege ludis « Mandragero » de Makiaveli), la Internacia vespero de kanto estis aparte ĝuindaj por la spektantoj. Dekoj da fakaj kunvenoj okazis kaj ankaŭ Blindula Kongreso.

75 geinfanoj el 14 landoj aparte « kongresetis ».

La gejunuloj, sekvantan semajnon, kunvenis en Edinburgo.

La Londona kongreso adoptis rezolucion dirantan interalie :

« La prezentitaj raportoj ankoraŭfoje evidentigis la eksterordinaran gravecon de la problemo de interkomunikado ; tiu problemo postulas solvon por kiu, pro la konfliktantaj interesoj de la naciaj lingvoj, la neŭtrala Internacia Lingvo prezentiĝas kiel la plej racia solvo ».

La estontaj universalaj kongresoj okazos, en 1972, en Portland (Usono), kaj por 1973, en Beograd (Jugoslavio).

## LA JUBILEA KONGRESO DE S.A.T.

La kongreso de S.A.T. (por la kvindekjara ekzisto de la Sennacieca Asocio) okazis de la 1a de Aŭgusto ĝis la 7a de Aŭgusto en la Scienca Fakultato de Orsay (Proksime de Paris). La malfermon prezidis Prof. G. Waringhien. Por la Plenuma kaj Organiza Komitato parolis S-ro R. Michaud.

En Orsay, kie la kongresanoj kunvenis, manĝis kaj dormis, okazis kvin laborkunsidoj bone vizititaj.

Estis aranĝitaj pluraj distraj vesperoj, el kiuj unu kun arta programo (kantado de Ramona van Dalsem kaj recitado de N. Rytjkov).

Du interesaj prelegoj okazis : unu de Prof. Waringhien pri la arto skribi, dua de Sro Röllinger pri prahistoriaj homoj (kun lumbildoj).

La infankongreseto kunigis ĉirkaŭ 30 geknabojn. La prizorgantoj plenumis por ili tre varian programon.

La gvidrezolucio de la Kongreso entenas interalie : oni devas sin turni al la sindikatoj kaj aliaj laboristaj organizaĵoj, por ke ili, en la nuna lingva haoso, alprenu favoran sintenon al Esperanto.

## VINTRAJ MANIFESTACIOJ

— 15a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo « Homo kaj tekniko », Hamburgo, 27a — 12. 3a — I. Skribi al F-ino Ingrid Maier, Haupstr. 246, D-69 Heidelberg

— Internacia Fervojista Esperantista Skisemajno, 5a — 12a de Februaro 1972 en fervojista Sportdomo « Willi Merkl-Heim » en Spitzingsee (en bavaraj alpoj). Skribu kun respondkunpono al S-ino Elfriede Kruse, Schweizer Str. 104, D-6 Frankffurt/M.

## DETALA KATALOGO DE LIBROJ EN LA JARLIBRO DE U.E.A.

Por la unua fojo, la jarlibro (2a parto) du U.E.A. entenas detalan, eĉ ilustritan katalogon de la libroservo de U.E.A., kiu certe utilos por la aĉetantoj. Ne sufiĉas proklami ke Esperanto havas imponan literaturon ; necesas ankaŭ havi klaran ideon pri nia kumuna kultura riĉaĝo... kaj subteni ĝin per kelkaj aĉetoj ĉiujare !

## ĈU VI KONAS ?

... « Homo kaj kosmo » : tiu trimonata revueto estas ĉefe dediĉita al populara astronomio kaj novaĵoj pri kosmo-veturado. Ĝi ankaŭ informas pri la esperanta restadejo de Primoŝten, ĉe Adriatiko, en Jugoslavio.

... « Interlingvistika Informa Servo » : gvidata de D-ro Artur Bormann D-2057 Reinbek Schaumanns Kamp 126, Germanujo ; tiu interesa bulteno devus, interalie, esti atente konsiderata de ĉiuj seriozaj propagandistoj de Esperanto.

## JAPANA-KOREA RENKONTO

Dum la lasta printempo ; okazis japana-korea esperanto renkonto en Suda Koreujo... kun 30 minuta televida programo, vizitoj kaj publikaj.

## EN BRAZILO

Dum Julio, okazis la 6a Esperanto Seminario en la urbo Campos. Pli ol 300 esperantistoj el tuta Brazilo ĉeestis kaj la granda ĵurnalo « Jornal de Brasil » dediĉis tutan paĝon kun titolo en Esperanto.

# VIZONO

Kvankam elegantulinoj bone konas ĝian alt-prezan felon tajlitan por fari luksegajn mantelojn, tre malmultaj personoj interesiĝas pri la vivanta vizono. Maloftega je sovaĝa stato ĉar ĝi estis tro ĉasita en Nord-Ameriko, oni grandskale bredas ĝin en specialaj farmoj, kie oni selektas ĝiajn variojn.

Ĝia ĝenerala aspekto similas tiun de ĝiaj mustelidaj kuzoj : putoroj, foinoj kaj musteloj ; kiel ili, ĝi estas granda nervozulo, karnovora kaj obstinema ĉasisto ; ĝi klopodas por havigi al si prefereble malsekajn lokojn kaj volonte naĝas. Se oni sukcesis bredi ĝin en kaptiteco, tamen ĝi restas malsolida. La pasado de reakci-aviadilo mortigas ĝin je kora krizo ; viando ne sufiĉe freŝa morte toksas ĝin.

La ĝenerala aspekto de sovaĝa vizono estas tiu de granda densfela furo ; ĝi trakuras, kun bonrasaj irmanieroj, la bordo-randojn de la riveroj aŭ la bordojn de lagetoj ; laŭ rapida trotetado, haltante nur por kaŭriĝi aŭ stariĝi cele al observado, aŭ enŝoviĝi en malgrandan fendeton, kiun ĝi rapide inspektas ; kiel preskaŭ ĉiuj mustelidoj, la iranta vizono estas tuj ĉasonta ; ĝiaj predoj estas ronĝuloj, birdoj kaj fiŝoj ĉia-ampleksaj. Kuraĝe ĝi estus kapabla fronti karnovorulojn pli fortajn ol ĝi, ekz : renardo aŭ linko. Nur konscio de ĝiaj forto-limoj malhelpas ke ĝi sin ĵetu en tiajn entreprenojn.

Okaze de malabundeco ĝi alproksimiĝas al homaj loĝejoj por rabi ĉe kortbestejoj aŭ en kuniklejoj. Tio ne estas kutimo ; ĝi prefere estas malnomada kaj hejmosidema.

La multaj kaptiloj aranĝitaj de la kaptilistoj, ĉe komenco de nia jarcento, en la arbaroj de Kanada Granda-Nordo, starigitaj por kapti nur mustelojn allogis sovaĝajn vizonojn, kiujn oni tiam kaptis. Nu, je tiu epoko, oni konsideris la vizonajn felojn senvaloraj kompare kun tiuj de musteloj kaj siberiaj zibeloj. Do la kaptistoj malbenis la vizonojn, kiuj devigis ilin starigi novajn kaptilojn. Oni rakontas pri kaptisto, Malple Madison, kiu, en 1904, kaptis en Kanada Saskatchewan 4.832 sovaĝajn vizonojn, kies plej grandan parton li forlasis ; la kelkaj felojn, kiujn li gardis, permesis al li renovigi la tegaĵojn de sia glitveturilo ; oni rifuzis al li aĉeton de tiuj feloj, kiuj valoris apenaŭ un « cent-on » po la 12. Estas nur je la komenco de la Unua Mondmilito, ke la amerika modo lanĉis la vizonpelton. Oni rimarkis, ke konvene traktita, ĝi montras samajn kvalitojn kiel musteloj kaj zibeloj ; konsekvence la vizonĉasado ege ampleksiĝis.

### Ĉirkaŭpelita pro kaprica modo

Ĉar la pafilo povus difekti felon, kiu jaron post jaro plivaloriĝis, estas per mekanika kaptilo, ke oni ĉirkaŭpelas la elegantan mustelidon. La famaj pelt-foiroj en Leningrad, Vancouver, Nov-Jorko transitis 50.000 felojn en 1910, por atingi jaron post jaro 4 milionojn en 1936 kaj pli ol 6 milionojn en 1950. Oni povas estimi, ke, en Kanado, la nombro de la sovaĝaj vizonoj pasis de 45 milionoj... al, nune, malpli ol 3 milionoj ; la specio retroiris antaŭ homoj kaj nune okupas nur la plej nordajn landojn, ĉar mantelo el sovaĝa vizono estas pli ŝatata ol iun ajn alia.

Vizono vivas ĝenerale ĝis 6 kaj eĉ ĝis 14 jaroj ; la femalo naskas ĉiun printempon 3-4 idojn ĉe fundo de ternesto aranĝita en bordorando de rivero. Evidente estas, ke tiu febla fekundeco al kiu aldoniĝas ĉiuj natur-riskoj kondukas la specion al ĝia malapero, se ĉasado senhalte daŭrigas sian persekutadon ; tio okazas por la eŭropaj vizonoj ; krom en norda Siberio oni renkontas nur maloftegajn bestojn en Skandinavio.


### Giganta kaj fragila entrepreno

Bredadoj liveras 88 % de la komerciitaj peltoj ; la altaj kurzoj atingitaj de la vizonpelto instigis al pli ampleksa bredado. Tial oni selektis la sovaĝajn bestojn, kiujn oni kaptis en arbaroj por reproduktigi ilin en kaptiteco.

La sukceso estis tiom granda en USSR, ke oni multigis bredadojn tiom en USA, kiom en Eŭropo. Eĉ oni akiris novajn kolorojn : paŝtela grizo, rozkolora okro, pura blanko. La bredata vizono nuntempe donas 88 % el la 35 milionoj de la komerciitaj feloj kaj konstituas valoron je 396 milionojn da dolaroj. Tamen, ĉar la vizonoj restas malsolidaj, ilia bredado povas okazigi financajn malfacilaĵojn. Sufiĉas memori tiun bre-

dejon ĉe Garrison-lago (en Nord-Dakota-USA), kiu en 36 horoj perdis siajn 118.000 vizonojn pro viando iomete difektita.

Ĉasado kontraŭ vizonoj daŭras, sed restas la espero, ke la specio konserviĝos. Necese estas, ke la sovaĝaj vizonoj postvivu por renovigi la sangon de la breditaj bestoj, kies pelto iom post iom iĝas malpli bela ol ĉe la sovaĝaj.




EN 1972

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

ESTOS 20 jara

Vi NEPRE devas ĝin viziti je tiu okazo

Skribu al : E.K.D., Château de Grésillon -- 49-BAUGÉ (F.)

# LA GRANDA PIRAMIDO

Ĉiuj scias, ke Egiptujo estis iam la patrujo de tre antikva civilizacio. La arkeologoj trovis sur ĝia teritorio ŝajne ne elĉerpeblan fonton de monumentoj kaj dokumentoj. Ties studo naskis dum la 19a jarcento novan sciencon : egiptologio.

Inter tiuj antikvaj atestantoj de malaperinta civilizacio, la plej strangaj kaj enigmaj monumentoj estas la piramidoj. Sendube, multaj estis tomboj de faraonoj. La plej famaj estas grupo de tri piramidoj kaj unu stranga monumento, la Sfinkso. Hodiaŭ, mi parolos al vi pri la plej fama el tiu grupo : la Granda Piramido.


Ĝi staras en la delto de Nilo, proksime de la urbo Kairo. Ĝi situas ĝuste sur la bazo de la delto, kaj estas geometrie ekzakte orientita laŭ la kvar geografiaj ĉefpunktoj. Tio estas : ĉiu el la kvar facoj de la piramido frontas unu el tiuj punktoj.

Tiu monumento situas proksime de la vilaĝo Gizeh. Ĝi estas ankaŭ konata laŭ la nomo : piramido de Heops. Kial tiu nomo ? Ĉar tiu faraono reĝis dum la konjektita epoko de la konstruo, kaj li estus kontrolinta la laboron, ĉirkaŭ la jaro 2 600 antaŭ J.K. Ĝi do jam ekzistas depost pli ol 5000 jaroj. Fakte, oni trovis ke, la enirejo situanta sur la norda faco, estas ekzakte en la direkto de la stelo Siriuso aŭ Alfa de la konstelacio Drako ; kaj ke la 21an de septembro de iu difinita jaro, tiu stelo estas videbla de en la enirejo. Por tio, estis necese, ne nur koni la ĝustan pozicion de la stelo je tiu preciza epoko, sed ankaŭ kalkuli la refrakton de la lumradioj tra la atmosfero ! La kalkuloj de la astronomoj indikas la jaron 2592 antaŭ J.K. de nia kalendaro. Ankaŭ ekzistas antikva tradicio, kiu diras, ke la konstruo okazis antaŭ 31 000 jaroj ! Kompreneble, ĝi ne estas fidinda.

La plej grava kaj historia dokumento kiun ni posedas pri tiu temo estas la rakonto de Herodoto, greko alnomita « la Patro de Historio », kiu vivis dum la 5a jarcento antaŭ J.K. Li asertas, ke li ricevis siajn informojn de Egiptaj pastroj.

Laŭ li, oni bezonis por tiu laboro cent mil virojn, kiujn oni ŝanĝis ĉiun trian monaton. Jen parto el lia teksto :

« Pri la tempo dum kiu la popolo estis



tiel turmentita, oni pasigis dek jarojn por konstrui la ŝoseon sur kiu oni devis treni la ŝtonojn. Tiu ŝoseo estas laboraĵo apenaŭ malpli konsiderinda, laŭ mia opinion, ol la piramido mem, ĉar ĝi estas kvin stadojn longa kaj dek orĝiojn larĝa kaj ok orĝiojn alta ĉe la pli granda alteco (1), ĝi estas el poluritaj ŝtonoj kaj borderita de bestaj figuroj. La piramido mem necesigis dudek jarojn de laboro. Ĝi estas kvadrata, la lateroj de ĉiu faco estas ok-plektraj (2). Ĝi estas plejparte el poluritaj ŝtonoj perfekte kunigitaj, el tiuj ne unu estas malpli ol 30-futojn longa (3).

« Tiu piramido estis konstruita laŭ ŝtu-

---

(1) proksimune 900 metroj, 20 metroj kaj 15 metroj.
(2) proksimune 240 metroj.
(3) proksimune 9 metroj.

poj. Kiam oni estis komencinta la konstruon laŭ tiu maniero, oni levis el la tero la aliajn ŝtonojn, kaj per maŝinoj faritaj el mallongaj lignopecoj oni surmetis ilin sur la unuan murbazon. Kiam ŝtono estis tie lokita, oni metis ĝin sur alian maŝinon, ĉar estis tiom da maŝinoj kiom da murbazoj ; de tie oni ĝin levis per tiu maŝino ; eble ankaŭ ili havis nur unu solan maŝinon facile transporteblan de unu murbazo al la alia, ĉiufoje kiam oni deprenis la ŝtonon. Mi raportas pri la afero ambaŭ-maniere, kiel mi ĝin aŭdis. Do, oni komencis tegi kaj perfektigi la supron de la piramido ; de tie oni laboris malsupren, iris al la subaj proksimaj partoj ; fine oni prilaboris la malsuprajn kaj tiujn kuŝantajn sur la tero. »

Do necesis proksimume tridek jarojn por la konstruado : dek jarojn por la alira ŝoseo (nun malaperinta) kaj dudek jarojn por la monumento mem. Oni taksas la totalan pezon de la piramido je ses milionoj da tunoj. Ĝi konsistas el 200 masonitaj murbazoj meznombre unu metron altaj. La bazo estas kvadrato latere 227 metrojn longa, la alto estas 147 metro. Ĝi havas tiun apartaĵon, ke ĝi finiĝas per platformo ses metrojn latera... Kial ĝi ŝajnas nefinita ? La kialo sendube rilatas je ĝia simbola signifo.

Certe estas, ke la planoj estis tre antaŭtempaj antaŭ la konstruo. Laŭ tre antikva tradicio, ili estis alportitaj en Egiptujo fare de unu el la nepoj de Hanoĥ, SISISTROS (4). Tio povus koincidi kun la kronologio de la Biblio. Sed kompreneble ĝi estas nekontrolebla.

La unue konata provo por deĉifri la enigmon de la Piramido datiĝas de la jaro 820a post J.K. Laŭ arabaj dokumentaj konfirmitaj de la esploroj faritaj dum la 19a jarcento, kalifo Al-Mamum, posteulo de la fama Harun-al-Raŝid, entreprenis ĝian esploron. Ĉu pro scienca scivolo ? Kredeble pro avideco, ĉar li kredis, ke li trovos en ĝi sarkofagojn kaj grandegajn riĉaĵojn. Je tiu epoko, la Piramido ne havis la nunan aspekton. La tegaĵo el blankaj kalkaj ŝtonoj faris el la Piramido, blokon absolute glata, sen iu videbla enirejo. Oni atakis la nordan facon, je proksimume ok metrojn de la bazo. Detruinte la tegaĵon je tiu loko, oni fosis irejon en la masonaĵo, direkte al la centro. Post longaj semajnoj de peniga kaj senfrukta laboro, oni estis preta rezigni, kiam falo de ŝtono ebligis la eltrovon de la suba aŭ « descenda koridoro ». Fine, post multaj malfacilaĵoj la laboristoj envenis en la loko konata kiel « la Ĉambro de la Reĝo ». Tie, ili trovis nur malplenan ŝtonan kofron sen kovrilo.

(4) Laŭ la Biblio, Hanoĥ estis granda profeto, patro de Matuzaleĥ. Tiu ĉi vivis 900 jarojn. La « Libro de ĥanoĥ » antaŭa je la Biblio ne estis akceptita de la Eklezio kiel « rivelita » libro.

Malgraŭ la sistemaj esploroj kaj sciencaj mezuradoj faritaj ekde la 19a jarcento, la Piramido jam ne tute liveris siajn sekretojn. Nuntempe oni faras sondojn per elektronikaj rimedoj, esperante eltrovi aliajn ĉambrojn kaj koridorojn.

La Granda Piramido, prave taksata kiel la plej granda mirindaĵo en la mondo starigas multajn enigmojn al niaj modernaj scienculoj. Dum longa tempo oni pretendis, ke ĝi estas tombo de faraono, kredeble de Heops. Nun ni scias, ke ĝi estas reale inica templo kaj la sankta deponejo — la arkivoj oni povus diri — de iuj scienco kaj saĝeco iel tre superaj al nia moderna scienco.

Jam komence de la 19a jarcento granda franca verkisto, Gérard de Nerval (1808-1855) diris ke, ĝi utilis por celebrado de la antikvaj Misteroj kaj, ke Orfeo kaj Moseo tie ricevis la superan inicon. Tio okazigis al la verkisto multajn mokadojn de la tiamaj sciencistoj. Oni trovis en koptaj kaj arabaj manuskriptoj konfirmon de tiu sankta karaktero de la Piramido.

Sacerdoto Moreux (1867-1954) direktoro de la Observatorio de Bourges, parolinte pri la eltrovoj faritaj de astronomoj kaj sciencistoj en la Piramido, konkludis jene :

(Daŭrigota).

E. MOTILLON.

# "Vivo-buljono" en la supozita vakuo de la galaksiaj spacegoj

### Inter la steloj, VAKUO ne ekzistas :

Kunigitaj en nuboj dikaj kiel nebuloj, molekuloj de metano, amoniako, formolo kaj aliaj formas la naturan medion meze de kiu naskiĝas steloj ; medion, kies konstituantoj estas la bazo de la VIVANTA MATERIO.

—

Je la komenco estis homo, kiu, la unua, konsciiĝis pri tiu stranga kaj mirinda eco : esti Vivanta Estaĵo !

Li tiel gloriĝis pri tio, ke li opiniis sian modestan genton : Centro de la Tero, kaj la Tero : Centro de la Mondo !

Sed SAĜO venis, kiu — iom — dispelis tiujn pretendojn : ĉiu tribo kredis sin plej supera kaj plej inteligenta. Sed progresoj ĉe la Civilizacioj precizigis lokon de ĉiu tribo rilate al la aliaj. Galileo situis la Teron en sia ekzakta loko : malgranda planedo ekstera al Suno. Tiutempe oni opiniis Sunon centro de la Mondo kaj Teron unika astro, sur kiu Vivo kaj Inteligenteco ĉeestis kaj nur tie-ĉi.

La nuntempa astronomio pli ekzakte montras sunon : minora stelo de la galaksio — pliĝuste — loĝanta en unu el ĝiaj eksteraj kvartaloj. Pri la galaksio mem oni rapide malkovris, ke ĝi ne estas unika, sed nur amaso da steloj inter miliardoj da aliaj galaksioj !

Ĝis nun oni kredis, ke nur Tero portas Vivon. Multaj serĉistoj akceptis tion, kiel miraklan hazardon ; eĉ se Vivo alie ekzistus, ĝi povus esti nur izolataj kazoj inter miliardoj da steloj kaj nur primitiva vivo ! Einstein mem ankoraŭ ne sukcesis deloki tiun lastan misesperon.

Pli detala studo de la plej malproksima ĉielo ĵus forigis tiun lastan iluzion : ŝajnas, ke pli ol escepto, en la Stela Universo, VIVO ESTAS REGULO ; kaj eĉ ne temas pri belaj planedoj ĉirkau dika suno : oni ĵus malkovris, ke modestaj interstelaj nuboj — subtilaj nebuloj, kiuj flugas inter la steloj — entenas, en kvanto ŝajne senlima, la konstituantojn mem de la Vivanta Materio... Sendube, en la Universo, ne nur Homo portas Inteligentecon !

—

### La afero komenciĝis en 1951

La radio-astronomio (naskita de la radarantenoj dum la unua mondmilito) ĵus rivelis ĉeeston de vastegaj nuboj konstituitaj de Hidrogeno-molekuloj. Tiuj nuboj, laŭlitere, priloĝas la tutan spacon — kiun oni kredis vakua — inter la steloj.

Certe, jam de 1930 oni sciis, ke la interstela spaco entenas polvojn, tiagrade ke ili tute vualas kelkajn ĉiel-regionojn. Sed oni ankoraŭ ne konis la esencon de tiuj polvoj ; kompense, multaj studoj koncernis densecon kaj dispozicion de tiuj polvonuboj. Oni devis ankoraŭ precizigi ilian komponaĵon, kio estas multe pli malfacila. Anstataŭ studi la polvojn mem, la observantoj — dank'al ekzistanta fizika procezo — malkovris la naturon de la gasoj, kiuj naĝas meze de tiuj polvoj ; kiel ĉia materio, gasoj kaj polvoj estas formataj el atomoj (atomoj konstituataj el nukleo, ĉirkaŭ kiu turnas elektronoj).

En la Spaco, tiuj gasoj ne estas en absoluta ripozo : kontraŭe al tio, kion oni povus pensi, ilia temperaturo ne estas nula : tio okazigas termikan movon de la molekuloj kaj precipe tiuj gasoj estas submetataj al intensaj elektromagnetaj radiadoj devene de najbaraj astroj : steloj, elektritaj nuboj, « novae » K.T.P. Fare de tio, la elektronoj ŝanĝas sian orbiton, aŭ, pli ekzakte, ŝanĝas sian energio-nivelon ; ĵetitaj sur altan orbiton — dank'al ekstera energio (lumoj, radio-ondoj, termika movo) — ili forlasas tiun pro-ekscito-nivelon por refali en nivelon de basa energio. Samtempe ili emisias elektromagnetan radiadon, precize difinitan por ĉiu atomo ; tiu radiado estas karakterizata per linioj. Tiuj linioj iras de la kurtaj ondoj de la « ultraviolaj » ĝis la ondoj de la radio, preterpasante la kampon de la videbla lumo ; ĉiu substanco havas proprajn liniojn kaj en tio kuŝas la eblo, kiu permesas determini la naturon de tiuj interstelaj gasoj. La radaroj de la dua mondmilito (grandaj ricevilaj antenoj, similaj je dratretitaj bovloj) alportis al la astronomoj la ilon necesan por detekti tiujn liniojn.

### La Vivo ne komenciĝis sur Tero

En Spaco la plej malproksima, nuboj obskuraj aŭ brilantaj el kiuj pli poste eliros steloj kaj planedoj estas konstituataj el la kompleksaj

molekuloj de la organika kemio ; alidire : la kemio de la VIVO plenigas la Spacon.

---

**Vivo-elementoj inter la steloj**

Do, jam en 1951, radio-observado komenciĝis ; ĝi permesis detekti la liniojn, kiuj karakterizas la neŭtran hidrogenon (kiu estas molekulo farita el 2 hidrogeno-atomoj). La ondolongo de tiu emisio, 21 cm, fariĝis klasika valoro en la radio-astronomio. Oni sukcesis starigi mapon montrantan dispozicion kaj densecon de la hidrogeno-nubo en nia tuta galaksio.

En 1957, Profesoro Ch. Townes (Nobel-Premio pri Fiziko por liaj laboroj pri amplifiko de la ondoj fare de maser efekto) reprenis la studon de tiu problemo kaj proponis kelkan nombron da aliaj emisio-linioj, kiuj povus estis observataj sur la ĉielo. Fine, post 6 jaroj da serĉoj, subite aperis la spektro karakterizanta H-O-radikalojn (laŭ ondo-longo 18 cm.) ; ĉi-foje la emisio estis tro febla por permesi starigon de mapo tra la galaksio ; sed oni tenis la pruvon, ke povas ekzistis kunigon de atomoj en la interastra vakuo.

Ankaŭ oni notis ĉeeston de fontoj multe pli potencaj ; iliaj tre apudaj emisio-linioj kaj aliaj observadoj permesas pensi, ke povus temi pri formiĝo de steloj.

Baldaŭ optika astronomio, uzante spektrografion, montris ĉeeston de molekuloj KH (karbono-hidrogeno) kaj KN (karbono-azoto). En decembro 1967 Prof. Townes malkovris amoniakon kaj, kelkajn monatojn pli poste akvon (1,35 cm.). Trovi akvon en la interastra vakuo, dum oni dubis ĝin trovi sur Luno, alportis novajn revojn. Amoniako (1,20 ĝis 1,34 cm.) aperas en granda nombro da inter-astraj nuboj situantaj en la Centro de la Galaksio. Akvon oni trovis en 8 malsamaj lokoj. Tiuj fontoj montriĝas tre malgrandaj rilate la astrajn dimensiojn.

Inter 23 fontoj studitaj pere de radioteleskopo, 15 prezentas liniojn, kiuj karakterizas formaldehidon (6,2 cm.). Tiu molekulo, la pli kompleksa ĝis nun malkovrita en la Spaco, implicas, ke interstela kemia evoluo estas multe pli kompleksa ol la astrofizikistoj supozis. Plue ĉeesto de formhaldehido, de 2 hidrogeno-atomoj kaj de l oksigeno-atomo ligitaj al l atomo de karbono garantias praktike certan ĉeeston de metano ($CH^4$) en la galaksiaj polvonuboj. Nu, metano estas unu el la esencaj ingrediencoj de ĉia primitiva buljono, kapabla kunigi la bazajn molekulojn necesajn al VIVO.

**Organika Materio, sed ne VAKUO**

Sed kio plej intrigas la astronomojn estas la rilato, kiu povas ekzistis inter tiuj diferencaj molekulaj fontoj. Asociataj al OH-molekuloj tiuj ingrediencoj formas nubon, kiun oni hodiaŭ rigardas kiel la unua stadio de la stelo-evoluado.

Akvo kaj formhaldehido samtempe aperas en la polvo-nuboj ; plue oni konstatis, ke kie estas amoniako (proksime de la centro de la galaksio) koincidas formaldehido en forta denseco.

Sed ĝis nun, neniu malkovris nubon en kiu estas asociataj la 4 molekuloj : OH, $NH^3$, $H^2O$, HKHO.

Tamen la specialistoj pri astrofiziko opinias ke tiaj nuboj devas ekzisti.

Ĉeesto de tiuj kompleksaj molekuloj igas pensi, ke temas pri unuaj densiĝoj, kiuj antaŭas la formiĝon de stelo kaj eble ankaŭ tie planedoj komencas naskiĝi.

De nun por la astronomo la demando estas : kiuj aliaj molekuloj ankoraŭ ekzistas en la interstela vakuo (se oni povas ankoraŭ paroli pri vakuo) ?

Io estas certa : metano devas tie troviĝi.

Nu, nunhore, ĉiuj molekulaj konstruaĵoj de Vivanta Materio estas sinteze refaritaj el gasaj buljonoj. Tiuj ĉi, kiuj fidele rekonstituas tion, kio devas esti la primitiva tera atmosfero, entenas metanon, amoniakon, hidrogenon kaj akvon ; iliaj proporcioj povas varii. Tiu origina miksaĵo, kiun oni opiniis propra nur al tera atmosfero, kontraŭe ŝajnas aparteni al interstela medio la plej vasta. Oni devas konkludi, ke la gasa medio favora al vivo-apero, retroviĝas ĉe ĉiu stelo do ĉe ĉiu planedo.

Plue oni devas aldoni, ke formaldehido estas konata kiel subprodukto rezultanta de la malkomponado de la aminaj acidoj. El tio oni povus konkludi, ke tiuj aminaj acidoj ĉeestas en la interstela medio.

Se tio estus, la astronomoj estus tirataj ekstere de la nefekundaj fiziko kaj mekaniko ĉielaj por eniri la pli vivantan regionon de la biologio. Fakte la aminaj acidoj ne estas alion ol tiuj kompleksaj molekulaj konstruaĵoj, bazo de la Vivanta Materio. Ankoraŭ pli ol antaŭe, tiu malkovro, meze de la interstela medio, de la konstituantoj de la vivanta materio, kondukas al tiu konstato kaj demando :

La Homo mem estas kunmetado de atomoj de Karbono, Hidrogeno, Oksigeno kaj Azoto ; atomoj neniel distingeblaj de tiuj entenataj en la ŝtonetoj de la strato !

Je kiu nivelo kaj eĉ je kiu stadio la Materio ĉesas esti INTELIGENTA ?

# LA LEONO

Patricia vokis min.

Glitanta kaj stumblanta mi grimpis laŭ deklivo, alkroĉiĝis al arbustoj, forŝovis la dornan heĝon per manoj disŝiritaj de la dormoj kaj sur kiuj la sango perlis. Trans la dorna muro estis larĝa spaco kun herbo malalta. ĉe sojlo de tiu savano unu nura arbo, ne tre alta. De ĝia nodoplena trunko, longaj densaj branĉoj similaj je rado-radioj, formis gigantan sunombrelon ; ĉe ĝia ombro leono surflanke kuŝis, leono en sia plej terura forto kun belega felo ; ĝia Kapo, kovrita de la kolhararo estis turnita al mi.

Inter ĝiaj antaŭaj kruroj enormaj, kiuj kvazaŭ lude elirigis kaj enirigis siajn ungegojn, mi vidis Patricia. Ŝia dorso premiĝis ĉe la brusto de la sovaĝa besto kaj ŝia kolo apudis la malfermitan buŝegon ; unu el ŝiaj manoj gratis en la monstra felo.

« King, la bone nomata King, la Reĝo ! » jen mia unua penso. La leono levis sian kapon kaj gruntis ; li estis jam vidinta min ; ĝia vosto balais la senmovan aeron kaj klakis kiel vipo-rimeno kontraŭ ĝia flanko. Pli kaj pli laŭte gruntis la leono, pli kaj pli forte klakis ĝia vosto.

Voĉo senigita je sono, tono, vibrado, ordonis al mi « Ne movo, ne timo, atendu ».

Per unu mano Patricia violente tiris sur la kolhararo ; per la alia ŝi gratis la kapon de la besto, inter ĝiaj okuloj ; samtempe ŝi diris, preskaŭ kantanta : « King, restu trankvila, tuj, restu trankvila, estas nova amiko ! ».

Ŝi unue angle parolis kaj poste ŝi uzis afrikajn dialektojn ; sed la vorto « King » senĉese revenis ; ĝia minacanta vosto lante ĝis tero kliniĝis ; la gruntado iom post iom mortis ; la nazego platiĝis sur herbo kaj denove la kolhararo, dum momento starigita, ĝin duone kovris.

« Faru unu paŝon » diris la sentona voĉo ; mi obeis ; la leono restis senmova sed ĝiaj okuloj ne plu lasis min ; « ankoraŭ » diris la sensona voĉo.

Mi antaŭeniris.

De ordono en ordonon ; de paŝo en paŝon, mi konstatis, kun teruro, ke distanco malpliiĝis inter la leono kaj mia propra karno de kiu mi kvazaŭ sentis la pezon, la guston, la sangon.

La mistera voĉo altiris min ĝis la kuŝanta besto. Estis al mi neeble malobei. Tiu voĉo, tion mi sciis en plena certeco, estis mia nura vivoŝanco, la nura forto, sed tiom hazarda, tiom nefirma, kiu nin tenis : Patricia, la besto kaj mi, en sorĉa ekvilibro.

Mi ĵus faris unu pluan paŝon. De nun, se mi tendus la brakon, mi tuŝus la leonon. Ĉi-foje ĝi ne plu gruntis sed ĝia buŝego malfermiĝis simila je brilega kaptilo ; ĝi duone leviĝis. « King ! kriis Patricia Stop ! King ! » ; ŝajnis al mi aŭdi nekonatan voĉon ; tiu ĉi estis ŝarĝita je volonto, impregnita je menfido, certa je sia potenco. En la sama momento Patricia kun sia tuta forto frapis la beston sur ĝia frunto ; la leono turnis la kapon al la knabineto, palpebrumis kaj trankvile kuŝiĝis.

« Donu vian manon, tuj » diris Patricia. Mi faris kiel ŝi volis. Mia polmo troviĝis sur la kolo de King ĝuste apud la kolhararo. « Ne plu movu » diris Patricia.

Silente ŝi karesis ĝian nazegon inter la du okuloj kaj ŝi ordonis : « Nun frotu ĝian nukon ». Mi faris, kiel ŝi diris. « Pli rapide, pli forte » ! insistis la Knabineto.

La leono iom tendis la nazegon por flari min de proksime, kaj fermis la okulojn. Patricia formetis sian manon ; mi, senhalte, karesis forte la flav-brunan haŭton. King ne moviĝis.

« Estas bone, vi estas amikoj, grave diris Patricia » Tuj ŝi ekridis kaj la naiva malico, kiun mi tiel ŝatis, redonis al ŝi la gajecon de infaneco.

« Vi multe timis, ĉu ne » ? ŝi demandis.

« La timo estas ĉiam en mi », mi respondis.

Je la sono de mia voĉo la granda leono malfermis okulon, kiun ĝi fiksis sur min.

« Ne haltu, frotu ĝian kolon, ne ĉesu paroli ! » ŝi tuj diris. Mi ripetis « la timo estas ĉiam en mi, ĉiam en mi, ĉiam... ». King momenton aŭskultis min, oscedis, streĉiĝis (sub mia mano mi sentis ondumi ĝiajn enormajn noditajn muskolojn) krucis siajn antaŭajn piedojn kaj restis senmova.

« Bone diris Patricia, de nun ĝi konas vin : odoron, voĉon, haŭton... ĉion ; nun oni instaliĝu por paroli ; sidiĝu ĉi tien ».

La leono turnis al mi sian kapon ; ĝiaj okuloj, unu fojon, du fojojn, tri fojojn iris al miaj manoj al miaj ŝultroj, al mia vizaĝo ; ĝi ekzamenis min kaj en la rigardo, kiun la « Granda de la Kilimandjaro » fiksis sur mi, mi vidis pasi pensojn, kiujn mi povus nomi unu post la alia : la scivolemo, la bondezireco, la bonkoreco, la nobleco de potenculo.

« Ĉio iras bone, ĉio iras bone », kantetis Patricia.

Fascinita kaj duonkonscia je miaj gestoj, mi kliniĝis sur la reĝan nazegon, kaj, kiel faris Patricia, mi gratetis, inter la larĝaj oraj okuloj, la

malhele brunan triangulon ; leĝera tremo kuris en la kolhararo de King ; ĝiaj pezaj lipoj tremis, streĉiĝis ; la faŭko iom malfermiĝis kaj la teruraj kaninoj dolĉe brilis. « Rigardu, bone rigardu, diris Patricia, ĝi ridetas al vi ! » Kial mi ne ŝin kredus ?

« Mi elektis la plej bonan momenton por tiu interkonatiĝo, ŝi diris, ĝi bone manĝis, ĝi estas sata, (ŝi batetis la potencan ventron) estas horo la plej varma ; ĉi tie estas multe da ombro ; ĝi estas feliĉa ! Vi vidas, tio estas nek terura, nek malfacila.

— « Kondiĉe, ke mi estu kun vi ! ».

Vere tio estis ebla nur dank'al Patricia, dank'al tiu malgranda knabino kun griza pantalono ; ŝi igis pensi pri silka raŭpo volvita ĉe brusto de leono. ...

« Patricia, diru al mi, kiamaniere ĉio ĉi komenciĝis ? ».

— Iun matenon, Kihoro, kiu akompanis mian patron, trovis en kavo de densejo, etan, apenaŭ du-tagan leonidon, tute solan kaj ankoraŭ blindan ; ĝi ploris.

